

*Parto 5:*

*Occidental-  
Interlingue*





## OCCIDENTAL-INTERLINGUE en Svislando

Edgar von Wahl (1867-1948), la aŭtoro de la planlingvo Occidental (Occ.), kiu estis publikigita en 1922 en Tallinn (Estonio), okupiĝis sinsekve pri Volapük, Eo kaj Idiom Neutral kaj fine elektis la naturalisman direkton en planlingvistiko, kiu liveris al li la bazon por krei Occ. Laŭkaraktere Occ. estas aposteriora planlingvo, kies celo estis starigi kompromison inter la principoj de internacieco kaj reguleco. La bazaj morfemoj de Occ. devenas ĝenerale el la latinidaj lingvoj, la ortografio ne estas konsekvence fonetika, ekzistas gramatikaj esceptoj, la akcento estas unueca, ankaŭ la deklinacio formiĝas laŭ unueca skemo. La ebloj de aŭtonoma vortfarado estas tre limigitaj, ĉar vorto estas akceptebla, nur se ĝi ekzistas en la latinidaj nacilingvoj. Ĝuste tia koncepto servis al la argumentado de von Wahl, laŭ kiu nur planlingvo kiel Occ. kapablas kontentigi la postulojn de la internaciaj komunikado kaj kulturo, estante pli internacia laŭ la vortrezoro, pli facila gramatike, pli fleksebla morfologie kaj sintakse, pli esprimiva, pli komprenebla kaj pli aŭtonoma ol ekzemple Eo aŭ Ido, kiuj laŭ li suferas pro sia artefarita, malnatura konstruo. Same kiel la naturalistoj intencis realigi la idealon de la tuja komprenebleco de sia planlingvo (G. Waringhien, esperantologiaj eseoj), von Wahl celis per Occ. atingi la publikon kulture kaj intelekte edukitan en la okcident(eŭropa) spirito. Verdire lia projekto devus funkcii en la senco de interlingvo ('lingua franca'), kiu estu tuj komprenebla al la scipovantoj ĉefe de la latinidaj lingvoj. Tiel aperis la slogano „Interlingue es li latin por omnes” (Occ. estas la latino por ĉiuj).

De 1922 Occ. trovis ne malgrandan cirkon de apogantoj, kiuj rekrutiĝis unuavice el la reformema idistaro. Diversaj Occ.-istoj ŝatis paroli kaj skribi pri la movado de la unuigita Eŭropo kaj vidis sin mem kiel pionirojn de estonta Paneŭropo (Hamburger, Klaesi, Matejka), aliaj aldonis al tio sian kristanan dimension (Hugo Fischer, Maissen, Creux).


En 1949 Occ. adoptis la lingvonimon *Interlingue*, ĉar oni opiniis, ke la malnova nomo ne plu taŭgas ekzemple por la propagando de la lingvo en la komunismaj landoj.

→*Cosmoglotta*, la ĉefa gazeto de la Occ.-movado, aperis inter 1922 kaj 1985 kun entute 286 eldonoj, kiuj estis redaktitaj plene en Occ.; ĉi tiu elstara revuo devas esti vicigita inter la plej longdaŭraj kaj seriozaj periodaĵoj planlingvaj.

*Svislando*: Meze en polemikaj disputoj inter adeptoj de Ido unuflanke kaj de Occ. aliflanke, kiuj daŭris plurajn jarojn, en 1927 Romanda Ido-Societo komencis pli profunde okupiĝi pri la kontraŭdiraj argumentoj de la diversaj lingvosistemoj. *Ric Berger* en Morges/VD estis taskita ellabori komparan analizon pri Ido kaj Occ. Ĉi tiu energia eksa e-isto konkludis, ke Occ. superas Idon kaj ĉiujn aliajn planlingvojn de li konatajn (*Cosmoglotta* 84/1932). Pluraj aktivaj idistoj kiel Josef Aschwanden, Arnold Schrag, Heinrich Nidecker, Jean Denzler, Adolphe Creux k.a. aprobis la vidpunktojn de Berger kaj per tio ankaŭ tiujn de von Wahl mem kaj ekpreparis sian transiron al Occ. En kunveno de la 21a de aprilo 1928 la membraro de Romanda Ido-Societo diskutis la aktualan situacion de la planlingvoj. La friburga pastro kaj filologo *Adolphe Creux* klopodis pruvi, el lingvistika vidpunkto, la avantaĝojn de Occ. Post kiam oni atingis la komunan interkonsenton, estis starigita *Sviss Association por Occidental (SAPO)* kun jenaj estraranoj: →*Ric Berger* kiel prezidanto, →*Adolphe Creux*, →*Fred Lagnel* kaj *Edouard Mayor*.



Fred Lagnel, Alphonse Matejka kaj Fritz Haas



Occidental-kurso de Ric Berger, 1934

En 1930 Edgar von Wahl vizitis la interlingvistikan konferencon de IALA en Ĝenevo kaj tiukaze renkontis kelkajn svisajn Occ.-istojn, inter ili Ric Berger, kiu pentris la estonan gaston en Morges (la bildo pendas en CDE-LI). En 1939 fondiĝis en Zŭrich *Societe Cooperativ del Occ.-Editiones (SCOED)*. Komence de la dua mondmilito la aktiveco por Occ. estis interrompita. Fine de 1941 estis starigita Senato de Occidental-Union, kiu elektis siajn membrojn el neŭtralaj landoj (Svislando kaj Svedio), nome Berger, Nidecker, Ritter kaj Matejka. En 1943-47 fondiĝis Occ.-grupoj en Basel (Nidecker, Pollog, Schild) kaj Luzern.

La progresoj de Occ. dependis de manpleno da aktivuloj iom individue agantaj en la klopodo funkciigi la Occ.-instituciojn kaj -servojn. Dum multaj jaroj Ric Berger en Morges/VD influis la svisan Occ.-movadon kiel ties 'spiritus rector', rolante kiel unua prezidanto de SAPO (ĝis 1933), kiu pli malfrue nomis lin honora membro. Li redaktis la gazeton *Svissia* (poste *Helvetia*) kaj verkis sennombrajn artikolojn, studojn, lerno-

librojn, ktp. Li kunredaktis la revuon *Cosmoglotta* (1934-50), kunlaboris kun SCOED kaj en 1942 fariĝis vicprezidanto de Occ.-Union. (→Interlingua)

Laŭregione agadis jenaj ĉefaj Occ.-istoj: *Carlo Edoardo (Edouard) Bieller*, *Josef Aschwanden* kaj *Jean Denzler* en Biel-Bienne, *Arnold Schrag* en Bern, *Fritz Haas* en Winterthur, *Kurt Hamburger* en St. Gallen, *André Schild* kaj *Carl Johannes Pollog* en Basel, *Hermann Alfred Tanner* kaj *Flurin Maissen* en Grizono, *Alphonse Matejka* loĝis en La Chaux-de-Fonds.

Ekde kelkaj jaroj la aferoj de Occ. en Svislando prizorgas *Erich Werner* en St. Gallen.

Sekvas la detalaj biografioj de la plej signifaj adeptoj de Occ. en Svislando, laŭalfabete de iliaj nomoj

### Josef ASCHWANDEN

1877-1957



A. naskiĝis en la kantono Uri, laboris kiel okulkuracisto en Biel-Bienne/BE (1918-31), poste en Baden/AG kaj de 1941 vivis en Luzern.

Kiel gimnaziano A. okupiĝis pri Volapük. Eon li malŝatis pro la finaĵoj en ĝia morfologio. En Ido, kiun li ekkonis per la germanlingva verko *Weltsprache und Wissenschaft* (Jena 1912) de Louis Couturat, Otto Jespersen, Wilhelm Ostwald k.a., li konstatis lingvan progreson. Sed pro fortaj duboj pri ĝia perfekteco kaj ankaŭ pro la trudema konduto

de la Ido-akademio, la prezidanto de la Ido-grupo en Biel-Bienne (fond. 1927) distanciĝis de la lingvo de Couturat. Kiam li eksciis pri Occ., unue li skeptikis pri la nova projekto, sed tamen aliĝis al ĝi en 1928. Sekve li publikigis artikolojn en diversaj lokaj gazetoj (*Seeländer Volksstimme*, *Express* k.a.), prezidis la Occ.-grupon en Biel-Bienne, membris en la prezidio de SAPO, ekde 1929 ankaŭ en la Occ.-akademio, kaj kontribuadis al la Occ.-revuo *Helvetia*. Lia espero, ke surbaze de Occ. la e-istoj kaj idistoj unuiĝos, estis vana.

→Ido en Svislando

**Ric Berger**

→parto 6: **INTERLINGUA**



## **COSMOGLOTTA**

Oficiala monata organo de Occ.-Union (ekde 1949: Interlingue-Union).

Fondita en 1922. Chapelle/VD 1935-50, daŭrigita en Cheseaux-sur-Lausanne/VD 1951-85 (plej lasta n-ro: 286). Redaktoroj estis: →Heinrich Nidecker, →Fred Lagnel; 1958-80: →Alphonse Matejka (La Chaux-de-Fonds). 1935-36 paralele aperis primovada informilo kun la nomo *Cosmoglotta-Informationes*, kiu estis daŭrigita en 1937 kiel serio B apud la serio A.

→Bibliografio (gazetaro)

Dekstre: du eldonoj de *Cosmoglotta* kun desegnaĵoj (kastelo de Nyon/VD kaj Gandria/TI) de Ric Berger



## **Adolphe CREUX**

1876-1933



C. estis filologo kaj katolika pastro en Sorrens/FR kaj Rue/FR. Kiel stenografo li adaptis la stenografian sistemon Duployé unue al Eo, poste al Ido.

Kiel idisto C. oficis kiel Ido-agento en Sorrens, kunaŭtoris Ido-lernolibron kaj komence de la 1920aj jaroj prezidis la svisan sekcion de Unio Katolika Idista. Sugestinte reformojn en la naturalisma direkto, kiuj estis rifuzitaj de Louis Couturat, kiel unua sviso C. aliĝis en 1922 al la lingvo Occ. kaj en 1928 kuniniciatis la transformon de Romanda Ido-Societo al SAPO, kies unua vicprezidanto li fariĝis. En 1929 la kunlaboranto de Ric Berger kaj de *Cosmoglotta* estis elektita kiel membro de la Occ.-akademio.

→Ido en Svislando →Friburgo

## **Jean DENZLER**

1871-1943



D. estis komercisto, kiu laboris ĉe la konsumsocieto COOP en Biel-Vingelz/BE, kie li estris la sektorojn pri aĉetado kaj personaro

(pensiita en 1936). Skeptika vidalvide de la tradiciaj politikaj partioj, li apartenis al la liber-ekonomia movado (kies anoj aktivis poste ĉe la iama partio Landesring kaj inter la verduloj).

Kiel eksa e-isto D. frue transiris al Ido, fondante la Ido-grupon en Nidau/BE (1910) kaj instruante la lingvon. Tuj post la fondo de SAPO en Lausanne (1928) li aliĝis al Occ. Kiel membro n-ro 8 de la nova organizo D. ekde 1929 ĝismorte oficis kiel ĝia revizoro kaj agadis kadre de Societe Cooperativ del Occ.-Edition (SCOED), estis membro de Occ.-Union kaj kontribuis redakte al diversaj Occ.-vortaroj.

→Ido en Svislando

## **Fritz HAAS**

1898-1971



H. vizitis la gimnazion en St. Gallen, doktoriĝis pri filozofio en la zurika universitato kaj sekve instruis matematikon en Odenwaldschule en Oberhambach (Germanio), kiu estis fondita de la reformpedagogo Paul Geheeb (1879-1961). 1932-61 H. laboris kiel matematikisto ĉe la asekurkampanio 'Winterthur'. Kiel eksa adepto de Ido H. aktive propagandis tiun lingvon kadre de sia Occ.-Centrale en Winterthur/ZH precipe tra la orientsvisa gazetaro. Pli malfrue - en la sama periodo kiel Alphonse Matejka - li aliĝis al Occ. Kiel sekretario de Akademie interimari de Occ. (1939-45) H. publikigis sennombrajn artikolojn en *Cosmoglotta*, verkis plurajn lernolibrojn kaj gramatikojn (→Bibliografio), krome li produktis gramofon-diskon kun la normprononco de Interlingue. Tiuj produktaĵoj parte aperis en lia propra eldonejo Inter-

lingue-Servicie en Winterthur kaj apartenas al la serioza didaktika literaturo de Occ. Kiel arda kaj senkompromisa defendanto de la lingvo de Edgar von Wahl, kiun li konsideris kiel idealan kombinon de sufiĉa natureco kaj facileco, H. ofte provoke kontraŭ-argumentis la aliajn planlingvajn sistemojn kaj sekve rikoltis akran polemikon. Antaŭ sia morto li ankoraŭ submetis al la redakcio de *Cosmoglotta* siajn plej novajn lingvajn reformproponojn, kiuj kulminis en la modifo de iuj reguloj en lia *Grammatica de Interlingue*.

→Ido en Svislando →Antologio

### **Kurt HAMBURGER**

1920-1962



H. estis komerca direktoro de teksaĵfabriko en St. Gallen.

Kiel gvidanto de Interlingue-Centrale en St. Gallen, prezidanto de SAPI (1952), administranto de Interlingue-Union, eldonanto de la revuo *Cosmoglotta*, H. organizis la internacian renkontiĝon de Occ.-istoj en St. Gallen kaj Romanshorn/TG (1958). Li aŭtoris diversajn artikolojn kaj propagandajn broŝurojn (*Die endgültige Form der allgemeinen Welthilfssprache*, 1943; *Unesco e mundlingue*, 1955; *Keine Angst vor Fremdwörtern und Fremdsprachen*, 1957, k.a. kaj prelegis en diversaj medioj (ekzemple en Europa-Union, 1955, ĉe la bontemplanoj kaj ĉe la Blua Kruco, 1959, ĉe la studenta unuiĝo de Appenzell, 1959, en Teenager Club, Heiden/AR, 1961, ktp.). Lia abrupta morto (pro tumor) kaŭzis al la tiama Occ.-movado ioman organizan perturbon.

→Antologio →Bibliografio

### **HELVETIA**

Tiel nomiĝis la organo de Sviss Association por Occ., kiel daŭriganto de *Svissia* ekde n-ro 9/1929. En 1934 la revuo *Helvetia* kunfandiĝis kun *Cosmoglotta*. Ĝin administris →Fred Lagnel kaj redaktis →Ric Berger.

→Bibliografio (gazetaro)



Titolpaĝo de la svisa Occidental-gazeto *Helvetia*

### **Ludwig KLAESI**

1881-1962



K., kiu devenis el la kantono Glarus, estis diplomita teksaĵisto, kiu fariĝis riĉa kotonkomercisto en Svislando, New Orleans (Usono) kaj Milano (Italio). Li estis konvinkita adepto de la eŭropa unuiĝo kaj kunfondinto de la svisa Eŭropa Unio, aktiva antropozofa (ekde 1936) kaj mecenato de la eŭropa kaj antropozofa movadoj.

K. restas en la memoro kiel malavara mecenato de la Occ.-movado. Neante la rolon de la angla lingvo kiel mondlingvo de la estonto,

K. iniciatis kadre de Eŭropa Unio specialan komitaton, kiu rezolucie rekomendis la aplikon de internacia planlingvo kiel neŭtrala universala lingvo (aŭ Eo, aŭ Ido, aŭ Occ.). Sed la gvidantoj de la organizo, kiuj rigidiĝis en teoriaj diskutoj kaj kiuj kaŭzis finfine ĝian pereon, maltrafis konkretiĝi pri la planlingva demando. Tial la rezolucio restis platona. Kvankam K. bonvenigis la laboron de IALA, li tamen forte bedaŭris la publikigon de la planlingvo Interlingua en 1951, ĉar li ĉiam esperis, ke la diskutoj en IALA kunproksimigos la diverĝajn vidpunktojn kaj kondukos al unuanima solvo.

K. verkis la ĉapitron 'Die Sprachenfrage' en la libro *Kampf um Europa*, kiu aperis en Europa Verlag Zürich / New York en 1945.  
→Bibliografio →Antologio

### **Frédéric (Fred) LAGNEL**

1901-1995



Ĉi tiu vaŭda instruisto (pensiita en 1963) engaĝiĝis ankaŭ en diversaj porpacaj medioj. En sia Ido-periodo L. estris la laŭzanan Ido-sekretariejon (1922), oficis kiel sekretario de Internaciona Ido Radio-Klubo, de Suisa Ido-Radio-Klubo (fond. 1924 en Zürich) kaj de Romanda Ido-Societo (fond. 1925) kaj kunlaboris kun la redakcio de la periodaĵo *Ido*. En 1928 li transiris, kun aliaj idistoj, al la planlingvo Occ. kaj sekve plenumis responsajn funkciojn en tiu movado kiel sekretario de la ĵus fondita SAPO kaj kiel administranto de la revuo *Helvetia* (ĝis 1933). Post la demisio de Engelbert Pigal en 1936 L. fariĝis la nova direktoro de la centra oficejo de Occ.-Union, kiu funkciigis la Svisan Occ.-Instituton, unue en Chapelle-sur-


Moudon/VD, de 1948 en Cheseaux-sur-Lausanne. En ĝia nomo L. presis grandegan kvanton da propaganda kaj asocia materialo krom en Occ. ankaŭ en la franca, germana, itala kaj angla lingvoj, eldonis *Bulletin del SAPO* (kiu poste nomiĝis *Svissia* kaj pli poste →*Helvetia*), kaj redaktis la centran organon de la Occ.-movado →*Cosmoglotta* ĝis 1980, kun →Alphonse Matejka. Ekde 1952 li deĵoris kiel sekretario-kasisto de SAPI kaj agadis kiel membro de la Interlingue-akademio. Kiel ĝenerala sekretario de Interlingue-Union (60aj jaroj) L. aktive partoprenis la denuncan polemikon kontraŭ Eo post ĝia rezolucia agnosko far Unesko en 1954.

→Ido en Svislando →CDELI

### **LI GYMNASIAST**

Jurnal periodic por Gymnasiastes catholic del modern Europa unit e cristian. Gazeto en Occ., kiu aperis 1957/8-61 por la katolikaj gimnazianoj en Disentis/GR sub la gvido de →Flurin Maissen. Ĝi propagandis la ide(ologi)on de la katolik-kristana Eŭropo pere de neŭtrala universala lingvo.

→Bibliografio (gazetaro)




Titolpaĝo de la revuo *Li Gymnasiast*





## Flurin MAISSEN

1906-1999



Baptita je la nomo Gion Fidel Luis, civitano de Sumvitg/GR, ĉi tiu aŭtentika grizonano trapasis la bazajn lernejojn en Glion-Ilanz/GR. 1919-27 li vizitis la gimnazion en Engelberg/OW kaj finis ĝin per la abiturienta ekzameno. Post studoj de filozofio, pedagogio, historio kaj historio de la arto kaj muziko en la universitato de Friburgo, en 1929 li aliĝis al la benediktana monaĥejo en Disentis/Mustér, kie en 1933 li fariĝis pastro. 1929-34 M. daŭrigis siajn studojn pri teologio en Einsiedeln/SZ (retoromanĉe: Nossadunaun) kaj Disentis/Mustér kaj en 1934-36 ankaŭ pri natursciencoj (mineralogio, fiziko, matematiko kaj geografio) en Friburgo (lic. rer. nat.). Lia doktora disertaĵo, verkita en 1944 pri mineralogio kaj kristaloj en la regiono de Surselva, estis publikigita en 1955 kaj represita en 1974 kiel grava fakverko sur tiu kampo.

M. laboris kiel instruisto en la meza lernejo (gimnazio) kadre de la monaĥejo Disentis inter 1936 kaj 1981: li instruis fizikon, mineralogion, matematikon, muzikon, la romanĉan kaj francan lingvojn. Krom tio li dediĉis multe da tempo al diversaj, iom avangardaj kampoj kiel la protektado de la naturo kaj defendo de la ekologio (ekz. Rejno), la gvidado de meteorologia stacio, la lanĉo de alternativaj energioj kaj la disvolvo de la biologia agrikulturo. Antaŭ ĉio li engaĝiĝis favore al la konservado kaj defendado de la retoromanĉa lingvo (Sursilvan), en kies parolregiono li vivis. Kiam en 1982 la nova artefarita skriblingvo Rumanĉ Griŝun (Rumantsch Grischun) estis prezentita de profesoro Heinrich Schmid en Zuriko al la publiko, M. skeptike reagis kaj fakte rifuzis tiun

projekton, polemikante kontraŭ ĝi, ĉar laŭ M. Rumanĉ Griŝun „neniam estis oficiala lingvo kaj ĝi neniam povos esti tia, precipe ĉar ĝi tute ne estas lingvo, kaj ĉar la intenco anstataŭigi du ekzistantajn skriblingvojn /retoromanĉajn/ kontraŭdiras la homajn rajtojn” (NZZ, 12.1.1996; en posta artikolo → Arthur Baur refutis liajn vidpunktojn). Kun siaj fratoj Alfons kaj Augustin kaj aliaj personecoj M. starigis diversajn organojn kun la celo protekti kaj diskonigi la retoromanĉajn lingvon kaj kulturon. La de li fondita Fundaziun Retoromana Placi a Spescha hodiaŭ portas la nomon de Pader Flurin Maissen. Kadre de sia okupiĝo pri retormanĉaj aferoj M. ludis ankaŭ la motoran rolon en la retormanĉa akademio Il Curtin, li fondis la porstudentan gazeton *La Talina*, publikigis multajn skribaĵojn kaj flegadis la retoromanĉajn muzikon kaj kantarton. La bieno-fondaĵo Benefeci Rumein en la komunumo Degen/Igels apud Laax/GR, kiu ekde 1966 estis administrata de M. kaj kie estas aplikataj alternativaj energioj kaj la biologia agrikulturo (biogaso, Sterling-motora), servis samtempe ankaŭ kiel centro por la studo kaj instruado de la retoromanĉa kulturo (programo de Rumein).


En la 1950aj jaroj M. okupiĝis pri Occ. kaj iom instruis tiun lingvon kadre de libervolaj kursoj en la monaĥejo Disentis. Tiucele li aperigis diversajn broŝurojn (*Interlingue-Occidental-Kurzgrammatik; Sprichst Du Europäisch*, 1954), redaktis la revuon → *Li Gimnasiast* (1957-61) kaj rilatis kun la viena Occ.-isto Hans Homolka (kiu nomis sin John Christian Homo kaj Interlinguisticus), kies bibliotekon li heredis (ĉi tiu biblioteko fine migris al CDELI). La periodo, kiam M. aktivis por la planlingvo, kongruis kun la tempo, kiam d-ro Homolka provis reformi Occ.-n, nomante ĝin Interlingua-Occ. aŭ → *Lingua de Europa* (1959); lia celo estis forigi ĉian ‘skemism’ en Occ., enkondukitan de von Wahl, favore al pli naturaj formoj, tamen li distanciĝis de la ‘sudlatinecaj’ formoj kiel ili aperas en Interlingua/IALA. (Okaze de la IALA-konferenco la 5an de oktobro 1937 Homolka prezentis prelegon sub la titolo ‘Das Planspracheproblem als Normungsaufgabe. Die Hauptgrundsätze der Normung und Occidental’).

En sia cirkulero el la jaro 1957, kiu reprezentis la Agadkomitaton por la Unuiĝo de Eŭropo fare de la gimnazianoj de Disentis, M. skribis: „Europa es barrat in un sac-strade... Grand cosas es fat por li comprehension del Europa. Noi vole far lu nor, porque Europa deveni denov grand in ti spiritu Occidental quel ha conservat grand li Europa anteyan: in li spiritu cristian...” (Eŭropo estas en sakstrato... Oni faras multon por la interkompreniĝo en Eŭropo. Ni volas kontribui la nian, por ke Eŭropo ree fariĝu granda en tiu okcidenta spirito, kiu pli frue konservis Eŭropon granda, en la kristana spirito). Per la revueto *Li Gimnasiast* M. serĉis rilatojn kun ĉiuj katolikaj gimnazioj de Eŭropo. En ĉi tiu rilato la ideoj de M. estis iom parencaj al tiuj de →Hugo Fischer (→Interlingua), kun kiu M. korespondis, same kiel kun →Alphonse Matejka.

Ankaŭ lia frato, d-ro Augustin M. en Usono, interesiĝis pri la planlingva demando. Kvankam M. poste dediĉis sin al aliaj aferoj, en letero al A. Künzli (1994) li tute ne bedaŭris sian eksperimentan planlingvistikan engaĝiĝon, kiun li entreprenis kun plezuro, kaj pritaksis ĝin interesa kaj utila sperto el la vidpunktoj de lingvistiko kaj praktika uzeblo. En la komputila epoko M. unuavice pensis pri perkomputila teksto-tradukado, parolante pri planlingvoj.

### **Alphonse MATEJKA**


1902-1999



M. estis la filo de svisino el la kantono St. Gallen kaj de aŭstria-hungaria ĉeĥo (ŝumaviano), kiu junaĝe migris de Bohemio al Svislando. M. mem fariĝis svisa civitano, kiam li

atingis la plenan aĝon. Post la gimnazio kaj la abiturienta ekzameno en St. Gallen kaj la metilernado en brodejo, M. laboris en ĝia pariza filio (1922-32). Sekve li estis dungita en la eksportfako de butonproduktejo en Zürich. Post mallonga aktivado en la amsterdama filio de tiu entrepreno, en 1937 M. instaligis en La Chaux-de-Fonds/NE, kie li daŭrigis sian profesian vivon kiel eksportfakulo en horloĝfabriko. En 1987, post la morto de sia franca edzino, M. retiriĝis de ĉiuj siaj funkcioj kaj transloĝiĝis al la urba maljunulejo L'Escale de La Chaux-de-Fonds, kie li mortis en sia alta aĝo de 97 jaroj.


La ĉefaj kondiĉoj, por ke M. fariĝu unu el la plej signifaj pioniroj de la svisa kaj internacia planlingvaj movadoj, estis lia forta intereso pri fremdlingvoj kaj la aktiva uzado de la internacia korespondado. Rolon en la universala pensado de M. ludis ankaŭ la intimiĝo kun la liber-ekonomiaj ideoj de Silvio Gesell (1862-1930) kaj la konscio pri la neceso de ortografiaj reformoj (minuskligo) de la germana lingvo. Mendinte en 1918 ĉe →Albert Nötzli lernolibron de Ido kaj komparinte tiun reformlingvon kun Eo, M. konvinkiĝis, ke el lingva vidpunkto Ido superas Eon – tial li neniam fariĝis e-isto.



Du aliaj fotoj de Matejka

Sekve en la Ido-movado M. rapide progresis kaj transprenis diversajn gravajn organizajn taskojn: unue kiel aktiva membro de la Ido-Societo St. Gallen (1919-22) kaj de la pariza Ido-grupo, poste kiel sekretario de Uniono por la Linguo Internaciona (1929-34), kies provizora prezidanto li estis en 1940, kaj kiel prezidanto de Suisa Ido-Societo (1934-35).

Krome li kunlaboris kun la periodaĵoj *Suisian Idisto* kaj *Ido-Kuriero*, redaktis *Ofical Buletino del ULI* (1928-31) kaj *Progreso* (1931-34) kaj partoprenis Ido-kongresojn en Praha (1926), Zürich (1928), Freiburg/Breisgau (1929) kaj Sopron (1930).



Lernolibro de Matejka el la jaro 1956

Kiam en 1922 aperis la lingvoprojekto Occ. de Edgar von Wahl, M. unue estis skeptika, sed iom post iom konvinkiĝis pri ĝia supereco kompare kun Ido kaj nur en majo 1937 transiris al la Occ.-movado, en kiu li fariĝis unu el ĝiaj plej eminentaj reprezentantoj. Por la Occ.-istoj, kiuj memoris la siatempe akran polemikon de la idisto M. kontraŭ ili (aperintan ofte sub la pseŭdonimoj Franko Veramido kaj Scorpion), tiu evento signifis ne malgrandan sensacion. Bone konante la organizajn kaj redaktajn talentojn de M., la novaj samideanoj tuj konfidis al li gravajn funkciojn: en 1937 M. fariĝis koresponda membro de la Occ.-akademio, 1943-46 estis ĝia provizora prezidanto kaj ekde 1949 ĝia efektiva prezidanto. Krom tio li estis prezidanto de la t.n. senato de la Occ.-Unuiĝo (1940-50). Apud tio M. verkis la ĉefajn ler-

nolibrojn kaj vortarojn de Occ., reprezentis ĝin ĉe IALA kaj korespondis kun von Wahl, André Martinet, →Albert Debrunner kaj aliaj konataj (inter)lingvistoj.

En 1937-58 M. kunredaktis kaj 1958-80 ĉefredaktis la ĉefan organon →*Cosmoglotta*. Ĉi tiu grava tasko igis lin respektata en la planlingva movado. La de li gvidata (kaj kontrolata) revuo ne nur aperigis liajn multajn lingvistikajn kaj beletrajn kontribuojn (ekzemple tradukojn el la verkaro de la rusa aŭtoro Anton Ĉeĥov), sed ĝi ebligis al M. ankaŭ kontraŭ-argumenti, polemike sed serioze, aliajn planlingvajn sistemojn, el naturalisma vidpunkto, kaj venke proklami la superecon de Occ. Ekzemple en 1943 li elpaŝis kun lingvistika kritiko kontraŭ la projekto Basic-English, en 1951 kontraŭ Interlingua (IALA) kaj recenzis aliajn efemerajn planlingvo-projektojn. En *Cosmoglotta* 200/1957 aperis lia brila kompara studo 'Interlingue e Interlingua'. Ekde la fondo de CDELI en 1967 M. aktive kunlaboris kun tiu planlingva arkivejo kaj ties arkivisto →Claude Gacond, reprezentante la movadon Interlingue. En 1972 resp. 1987 M. testamente donacis al CDELI grandparton de sia riĉa planlingva libro- kaj dokumento-kolekto.

→Ido en Svislando →CDELI

## **Heinrich NIDECKER**

1894-1982

Post la gimnazio en Mülhausen (Alsaco, kie li naskiĝis kiel civitano de Basel) kaj la kantona gimnazio en St. Gallen N. studis pedagogion, natursciencojn kaj anglan lingvon en la bazela universitato, kie li doktoriĝis pri la verko de Samuel Taylor Coleridge, poeto kaj filozofo el la angla romantismo (1924). Post kiam li laboris kiel instruisto en diversaj bazelaj lernejoj, N. trovis en 1924 postenon kiel bibliotekisto en la centra katalogejo de la universitata biblioteko en Basel, kie li prilaboris la fakojn anglistiko kaj filozofio ĝis sia pensiigo en 1960. Hobie li estis iom konata verkisto pri svisa muzik-historio.

Krom pri liber-ekonomiaj, muzik-sciencaj, fiziokratiaj k.a. teorioj N. okupiĝis pri la planlingva demando. N. estis prezidanto de la bazela Ido-grupo kaj de Suisa Ido-Federuro.

Dum la zurika Ido-kongreso (1928) li opoziciis al la konservema pozicio de →Albert Nötzli, kaj post la demisio kiel prezidanto de la Federuro li aliĝis al la Occ.-movado. En *Cosmoglotta* li gvidis la rubrikon pri ekonomiaj kaj sociaj temoj, en *Svissia/Helvetia* li skribis pri lingvo-reformaj problemoj en Ido, pri la lerneja reformo de Rudolf Steiner (1861-1925) kaj pri la mona kaj ekonomia teorioj de Silvio Gesell (1862-1930). Li fariĝis prezidanto de SAPO (1934) kaj publike prelegadis pri la komuna lingvo en la estonta Eŭropa Unio. Krome li tradukis la poemon *Prometheus* de Goethe al Occ. kaj okupiĝis pri la demando, ĉu popolkantoj entute eblas en mondlingvo. Jam frue N. komencis zorge kolekti valoran interlingvistikan materialon, kiu poste enkadriĝis en la biblioteko de la bazela universitato kaj fine estis transdonita al CDELI.

→Ido en Svislando

### **Hermann Alfred TANNER**

1873-1961



Post la duagrada lernejo en Samedan/GR T. studis komercon kaj lingvojn klasikajn, latinidajn kaj slavajn en Laŭzano, Neuchâtel kaj Leipzig (Germanio) kaj metilernadis en Leipzig kaj Munkeno por fariĝi - kiel lia patro - tipografo, kompostisto, grafikisto, desegnisto, pentristo, libro-ilustristo, verkisto kaj eldonisto. T. apartenis al la pioniroj de la kolora normigado kaj de la perkolora aŭskultado kaj starigis la t.n. Mondan Kolorinstituton. Krome li fondis la gazeton *Engadin Express* (Samedan, 1900) kaj diversajn sport-periodaĵojn, defendis la retoromanĉan lingvon, aktivis inter naturmediaj kaj kultur-

protektantoj kaj estis fervora alpgrimpisto, honora membro de alpista kaj trafika societoj. Kiel liberpensulo li kredis la eternan ĉenon de la renaskiĝo. En 1914-18 T. agis kiel milita korespondanto por pluraj svisaj gazetoj ĉe la orienteŭropa kaj itala militfrontoj. Krome T. membris en la Svisa Verkista Asocio kaj en la Svisa Metiunuiĝo (germanlingve: Werkbund) kaj estis majoro de la svisa armeo.

T. apartenis al la plej malnovaj planlingvaj pioniroj de Svislando, kiu 'trairis' sinsekve Volapükon, Eon, Idon, kaj kiu en 1928 aliĝis al Occ., kie li fariĝis komitatano de SAPO. Senkompromisa kaj preskaŭ skandala estis lia propaganda stilo: la kongresantajn e-istojn li ŝokis portante la Ido-stelon; poste li same provokis la idistojn dum iliaj kunvenoj per la signo de Occ. Post malsukcesaj provoj unuigi idistojn kaj e-istojn, finfine li aktive agadis kontraŭ Eo, ekzemple en kontaktoj kun la Internacia Edukoficejo en Ĝenevo (1929). Celante konatigi la lingvon Occ. inter retoromanĉoj (li mem estis filo de ladinromanĉino), li ne nur publikigis librorecenzojn kaj raportojn pri retoromanĉaj kaj occidentalaj temoj en la SAPO-organo →*Helvetia* kaj en la ladina periodaĵo *Fögl d'Engiadina* (Samedan), sed li ankaŭ adaptis la kurson *Occidental in 5 leciones* de Ric Berger al la retoromanĉa lingvo. Lia primontara libro *Zehn Jahre Bergführer Kluckers 'Herr'*, tradukita al Occ., ne estis publikigita. Ĉiam ĝenata de sia kaprica ostita malsano, kiu atakis lin dum la armedeĵoro kaj kiu suferigis lin dumvive, la honora membro de SAPI (1951) finfine rezignis pri ĉiuj aktivecoj kaj, ankaŭ mense ruinigita, retiriĝis en la malsanulejo de Tiefenau en Bern.

### **Aliaj aktivuloj**

**Carlo Edoardo (Edouard) BIELLER** (1892-1969) estis ital-devena korespondisto, dungita de la firmao Omega en Biel-Bienne, kies dokumentan centron li direktis. Li laboris kiel redaktoro kaj eldonisto de *Revue Internationale de Sténographie* (Aimé Paris). Kiel membro de la komitato de SAPO B. regule publikigis mallongajn artikolojn pri tiu plan-

lingvo en la supre menciita stenografia periodo kaj organizis regionajn kunvenojn por la adeptoj de Occ.

Ankaŭ **Hugo FISCHER** (1901-78), kuracisto en Escholzmatt/LU, aliĝis al Occ. komence de la 1950aj jaroj kiel komitatano de SAPI antaŭ ol transiri al →Interlingua en 1957.

En Grizono, d-ro **Notaporta GAUDENT** en Scuol-Schuls publikigis Occ.-koncernajn artikolojn en la loka romanĉlingva gazeto *Fögl Ladin*.

Ekde 1941 en St. Gallen por la Occ.-movado aktivis **Ernst KLÄUI** (1890-1961), instruisto kaj pedagogo por mallertaj kaj mense handikapitaj infanoj.

Alia kunlaboranto de la svisaj occidentalistoj dum la 1940aj jaroj nomiĝis **Walter LEUENBERGER** (\*1920), pastoro en Ursenbach/BE, de 1948 vikario en Lyss/BE.

En la 1950-60aj jaroj **Emil LIENHARD** (+1967) en Zumikon/ZH gvidis publikajn Occ.-kursojn en Zürich.

**Edouard MAYOR** (1902-48) gvidis la asekurejon La Suisse en Lausanne kaj estis prezidanto de *Circul Occidental de Lausanne* (fondita en 1938).

**Adolphe MOECKLI** (1899-?), oficeja direktoro reprezentanta la tajpilojn Hermes de la firmao Paillard & Co. SA en Lausanne, en 1932 adaptis Occ. al la stenografio de Stolze-Schrey kaj de 1934 apartenis al la komitato de SAPO. En 1934 li propagandis Occ. en la revuo *Europäische Jugend*.

**Charles PIAGET** (+1943), kiu same estis membro de la komitato de SAPO, propagandis Occ. dum sia vojaĝo tra la balkanaj landoj.

**Carl Johannes POLLOG** (1899-1975) estis d-ro pri filozofio, verkisto, sendependa ĵurnalistoj, matematika konsilinto de la svisa societo Sport-Toto. Naskiĝinta en Silezio, en 1934 li translokiĝis de Burgfelden (Alzaco) al Bazelo. Kiel iama e-isto, kiu en 1942 aliĝis al Occ., li sekve fariĝis membro de la bazela Occ.-klubo, vicprezidanto de SAPI (de 1950) kaj sekretario de la Interlingue-akademio (de 1951). Liaj artikoloj kaj recenzoj aperis en *Cosmoglotta* (1943-69).

**Joseph RITTER** (1904-?) en Chiasso/TI estis iama idisto, kiu fine de 1929 transiris al la Occ.-movado, kie li oficis kiel komitatano de SAPO (ekde 1934) kaj kiel oficiala reprezen-

tanto de Occ. en Tiĉino. Li verkis diversajn Occ.-lernilojn por itallingvanoj (*Curs de Occidental por Italianes*, *Vocabolario Occidental-Italiano* /kun Ilmari Federn/ kaj *Qualmen Occidental facilisat me li apprensi-on del tessinés dialect* - kiu estis speco de diplomverko por ricevi la Occ.-docentecon).

La propagandon de Occ. En la bazela regiono oni dankas unuavice al **André SCHILD** (1910-81). Ĉi tiu eksa e-isto membriĝis en SAPO ĉirkaŭ la jaro 1930 kaj direktis Oficie por li lingue international auxiliari Occ. En 1947 li publikigis sian propran planlingvon →Neolatino kun la celo evoluigi la naturalismon en planlingvo(j). Kiam en 1951 aperis la fundamenta vortaro Interlingua-angla (IA-LA), li aliĝis al la nova movado, forlasante sian propran sistemon, en kiu li investis multe da energio kaj mono. (→Interlingua)

Kiam **Arnold SCHRAG** (+1943) finis sian preskaŭ fanatikan Ido-periodon li transiris al la Occ.-movado en 1928. (→Ido en Svislando)

Ankaŭ **Kaspar STRICKLER** (1870-1958) en St. Gallen estis multflanka planlingvano, kiu en 1891 kiel juna instruisto en la zurika kantono dediĉis sin al Volapük kaj prelegis pri tio en Höngg/ZH antaŭ ol en 1906-08 adopti Eon en Seen/Winterthur kaj poste aliĝi al la Ido-movado. Jam pli maljuna S. elektis finfine Occ., por kiu li faris propagandon.


De **Paul STUMPF**, instruisto en Thun, kiu okupiĝis pri Eo kaj Ido, aperis en *Berner Schulblatt* (14.08.1948) artikolo pri la aktuala situacio de la interlingvistiko.

**Erwin WETTSTEIN** (1879-1943), teknikisto ĉe la svisaj fervojoj, ĉefo de la fervoja vartejo en Erstfeld/UR, en 1893/94 interesiĝis pri la lingvo Volapük, en 1925 komencis studi Idon, ĉar Eo ne plaĉis al li, kaj en 1928 ekokupiĝis pri Occ., kie li iom aktivadis.

Aliaj Occ.-istoj nomiĝis: *E.R. FAESI* (Schaffhausen), *Ferdinand HALLER* (Reinach/AG), *A. NOVELL* (Zürich), *Anton SCHÄFER* (Fribourg), *WALDNER* (Clarens) kaj *Werner ZIMMERMANN*.

Interreto:

<http://www.interlingue.org>



Edgar von Wahl, aŭtoro de Occidental; dekstre kun Otto Jespersen, sube en sia kabineto



La tombo de Edgar von Wahl en Tallinn (Estonio), fotita de A. Künzli en 1995, kiu vizitis ĝin kun la estona e-isto Jaan Ojalo.

